



Enhavo

- UMEA –membriĝu – apogu!
- Virusa retejo de UEA – *Esperanto* ankaŭ
- <edukado.net> kontribuas
- Franca agado pluiras: LME
- *Juna amiko* je via servo
- Hispana revuo malferma al vi.

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

EKO 2020-09 sendita el Budapeŝto la 3an de aprilo.

Membroj kaj apogantoj por UMEA

En nia ĵusa komuniko (numero 8) ni aperigis alvokon por pli da membroj por nia medicinista faka asocio, UMEA. Nun ni precizigas tion, laŭ klarigoj de la prezidanto de UMEA. Membriĝo estas limigita al profesiaj medicinistoj; jen la ĉefaj kriterioj laŭ ilia statuto.

A. Individua Membro (IM)

IM de la Asocio povas esti ĉiu kuracisto, dentkuracisto, farmaciisto, veterinaro, flegisto kaj ankaŭ ĉiu alia medicinisto, kiu aprobas la celon de la Asocio.

B. Studento-Membro (SM)

SM povas esti ĉiu medicina studento.

Por membriĝi: <umea<ĉe>uea.org. **Por informoj:** Tvitero: <ĉe>UMEAeo.

D-ro Klawe plie klarigas: “Ĉiujn aliajn personojn, kiuj interesiĝas pri nia laboro kaj apogas ĝin, mi metas sur apartan liston kaj dissendas al ili niajn gravajn komunikojn (ekz. la apogantaro ricevis la raportojn de profesoro Wang).”

Mi, la kompilanto de EKO, kiel unuopulo, tuj anoncis min kaj jam estas apoganto de UMEA. Same faris aliaj. Ni rekomendas la samon al vi! Skribu al: <umea<ĉe>uea.org.

Vidu la retejon: <http://umea.fontoj.net/>

Reta informejo de UEA pri la korona viruso

https://revuoesperanto.org/korona_viruso

Ĝin prizorgas la estrarano de UEA pri la Faka Agado, Amri Wandel. Ĝi donas aliron al tre detala laŭlanda resumo pri la aktuala stato.

<edukado.net> resumas sian jaron

La jarraporto pri la agado de nia retejo en la jaro 2019 estas preta kaj legebla. La publika raporto sen la detalaj financaj partoj elŝuteblas en la DOSIERUJO. En la dokumento vi povas legi ne nur pri la atingiĝoj kaj rezultoj de la pasinta jaro, sed ankaŭ pri niaj ĉi-jaraj planoj.

Krom tio ni informas vin ke en tiu ĉi malfacila periodo ni malfermis por ĉiu membro la kolekton de la instrumaterialoj, sekve vi povas libere elŝuti ion ajn el la ĉ. 900 materialoj kaj ekzerci vin en la deviga fermiteco. Ni daŭre provos disponigi al vi interesajn aferojn, bonvolu regule viziti nian retejon. Ni esprimas niajn sincerajn kunsentojn al ĉiuj membroj, en kies lando la viruso prenas siajn viktimojn kaj deziras al vi ĉiuj reziston.

Krome, pri la nuna situacio, iru al: <https://edukado.net/novajhoj?id=818>

Pliaj ligiloj:

<https://www.facebook.com/photo.php?fbid=10221670415819729&set=gm.3063894377001835&type=3&theater&ifg=1>

kaj

<https://www.monato.be/index.php>

Le Monde d'Esperanto

Jen la ligo al la nova LME: Le Monde d'Esperanto.

<https://esperanto-france.org/lme-605-l-unesco-une-priorite-du-mouvement>

Bonan legadon! [Claude Nourmont](#)

Vera amiko – Juna amiko

Reage al la nunaj tagoj, jen la unua numero de la renoma revuo de ILEI por niaj lernantoj estas je via dispono. Bv. legi ĝin kaj konstati ĝian kvaliton!

https://www.ilei.info/revuoj/JunaAmiko1_2020.pdf



Mez-Azio prokrastas sian inviton

Observante kaj konstatante la nunan situacion pri disvastiĝanta tutmonde kronvira epidemio, la organiza teamo de la MAK-2020 (https://uea.org/vikio/Unua_Mez-Azia_Kunveno) decidis transmeti ĉi tiun E-aranĝon en Duŝanbeo, Taĝikio al 2021. Ni okazigos ĝin inter la 1a-5a de majo 2021 kun la jam proponita/ korektota programo kaj posta ekskurso al Samarkando.

Hispana revuo libere alirebla rete

Ni ankaŭ decidis publikigi en la reto ĉiujn numerojn de "Boletín", kiuj nun estos libere legeblaj de ĉiuj parolantoj de Esperanto, sendepende ĉu oni estas ano aŭ ne. Trovu ilin kaj legu pli ĉe:

<https://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/408-publikigigita-la-nova-bulteno-de-hef-nun-malferme-alirebla>

Bonan legadon, kaj fartu bone!

Federación Española de Esperanto / Hispana Esperanto-Federacio
Rodríguez San Pedro, 13, 3. ES-28015 Madrid (Hispanio)
Tel: (+34) 914 468 079 / (+34) 638 547 104

Revuo Esperanto – Hodler – levas sin al la momento!

La 31-a de marto 2020 markas la 100-jariĝon de la morto de Hector Hodler. Tiu svisa esperantisto, kiu estis fondinto de UEA kaj motoro de la revuo *Esperanto*, sendube estas inter la plej gravaj laborintoj por nia afero. De la junulara agado ĝis bestoprotektado kaj la pacproblemo, de la nasko de pluraj iniciatoj ĝis la vasta kunordigo de la movado, sennombraj estis la kontribuoj de Hodler, kies vivo estis signifoplena por Esperanto. En la unua Mondmilito, li kaj la svisaj esperantistoj organizis poŝtan kaj komunikan servon por reunigi familianojn, dislokitaĵojn pro la milito.



Jen la spirito, kiun ni bezonas nun!

Omaĝe al li la aprila numero de la revuo estas libere elŝutebla ĉe uea.org/revuoj.

Vortoj: 640

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis 2019/15. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistaĵoj.